**N I A  V O Ĉ O**

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid

(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **JULIO-AŬGUSTO 2001**

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:

http://www.ciudadfutura.com/esperanto

## HISPANAJ AKADEMIANOJ

Ekde aprilo la Akademio de Esperanto havas novajn membrojn, inter ili Jorge Camacho, jam elektita en antaŭa periodo, kaj Miguel Gutiérrez Adúriz. Ambaŭ elektitaj por naŭ jaroj.

## UEA

Laŭ la lastaj datumoj (*Esperanto aprilo 2001*) la membraro de UEA en Hispanio dum 2000 estis 514 (HEF havas 413 membrojn). La totalo por 119 landoj estis 19.102 membroj.

## ESPERANTO EN *INTERNET*

Elektronikaj esperanto-libroj en pdf-formato vi povas aĉeti ĉe inko@omnibus.se

Materialo por legi:

Revistas: http://www.esperanto.se/virtuala/gazetoj.html

Literatura: http://www.best.com/~donh/Esperanto/Literaturo/literaturo.html

Radio:

http://www.ciudadfutura.com/esperanto/eradio

Lista de horas y frecuencias: http://www.osiek.org/aera/frekvint.html

Direcciones de emisoras: http://www.osiek.org/aera/adresint.html

Muziko:

http://esperujo.citeweb.net/unikode/muziko.html

http://artists.mp3s.com/artist_stations/113/esperanto.html

http://perso.wanadoo.fr/kultur.art.festival.es/es/EoMuziko.htm

http://www.rantac.com.br/users/alls (speciale por karaokeo.) Teksto de esperanto kun tutmonde famaj (klasikaj kaj modernaj) kantoj en nia lingvo.

Kalendaro de kongresoj, ktp...

http://www.eventoj.hu

Eûropa Esperanto Unio kun EEU-bultenoj: http://lingvo.org

## ESPERANTO EN AMASMEDIOJ

La monata ĵurnalo de la sindikato CNT (nº 268) dediĉas duonan paĝon al esperanto. Oni informas pri la 3-a Renkontiĝo de Hervás (Cáceres) kaj pri la esperanta kurso okazinta en Don Benito (Badajoz). La teksto aperas en la hispana kaj en esperanto. La sindikato de Don Benito faris enketon inter siaj membroj por scii kiom da ili estas interesataj koni kaj uzi esperanton ene de la organizaĵo.

## HISPANIO

En **La Laguna** (Tenerife) dum Julio akazos ekspozicio de pentraĵoj pri ĉevaloj, en ĉevala klubo. Sed okazas ke tiu ekspozicio nomiĝas "ĈEVALOJ". La pentraĵoj estas faritaj de bonega pentristino, kies nomo estas Patricia González Luis, al kiu multe plaĉas tiuj noblaj bestoj, eĉ ankaû simpatias pri la ideo de Esperanto. Ŝi ankoraû ne estas esperantistino, sed interesita pri tiu lingvo demandis al la E-grupo la nomon "Caballos" en Esperanto.

Ankaŭ en La Laguna okazis la fermon de la III Curso de Introducción al Esperanto y su Cultura, universitata kurso kun 3 kreditoj rn la kategorio “libre elección” (Facultad de Filologia, Campus de Guajara). Leandro Trujillo, Universitata Proferoso kaj Prezidanto

de la Real Sociedad Económica de Amigos del País, de Tenerife, prelegis pri esperanto en Kanariaj Insuloj kaj la ĉefa papero de La Laguna dank'al la laboro de Régulo Pérez



**HEF ANGULO**

Lunde kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson 91 446 80 79. Ankaŭ e-poŝto: admin@esperanto-es.net

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

| | |
|---|---|
| 14-18 julio | 11a Internacia Esperanto-Forumo. Cheste (Valencio) |
| 14-20 julio | 74a Kongreso de SAT. Nagaykanizsa (Hungario) |
| 21-28 julio | 86a UK Zagreb *www.srce.hr/esperanto-kel/ukzagreb.htm* |
| 1-8 aŭgusto | 57a Internacia Junulara Kongreso. Strasburgo (Francio): http://purl.org/net/ijk2001 |

## HISPANA E-KONGRESO EN SAN JAVIER

Ĝi okazis de la vendredo 22ª ĝis la dimanĉo 24ª de junio, kun postkongresa semajno tuj sekve. Partoprenis samideanoj el diversaj landoj, krom Hispanio: Portugalio, Rusio, Israelo, Britio, ktp.

La inaŭguron partoprenis la Urbestro kaj la Skabeno pri Kulturo de San Javier; ambaŭ ili parolis laŭde al la internacia lingvo. Sekve ni ĉiuj promenis ĝis proksima placo, kiu ricevis la nomon Plaza Esperanto. Sekve, la Urbodomo regalis nin per abunda aperitivo.

En la Nokto de Sankta Johano la kongresanoj povis partopreni la popolan kermeson, kun bruligo de bela kartona statuo.

En du sesioj Miguel G. Adúriz gvidis seminarion pri eldonado kaj kompostado per komputilo.

En la ĝenerala asembleo de HEF reelektiĝis la sama estraro por plia 4-jara periodo. La Prezidanto (Miguel Angel Sancho) informis ke Boletin ne aperigos informojn en aliaj lingvoj ol esperanto. Ĉi tiu decido estis varme aplaŭdita de kelkaj esperantistoj

Dum ĉiuj tagoj funkciis ampleksa libroservo. La nombro da kongresanoj estis ĉirkaŭ 70.

Augusto Casquero sin oferis por organizi la kongreson venontjaran aŭ enTeruel aŭ en Salamanca. Augusto denove organizos la HEF-Kongreson en Valencia en la jaro 2003 kiel omaĝon al la (100) centjariĝo de la Valencia Grupo.

Dum la postkongreso kelkaj esperantistoj el malsamaj landoj (Hispanio-Rusio-Britio) vojaĝis en privata automobilo tra la tuta regiono kaj visitis La Manga, Cartagena, Lorca, kaj Murcia kie kuniĝis kun murciaj esperantistoj kaj tagmanĝis kune en vegetarana asocio.

MADRIDA ESPERANTO-LICEO ne faros lundan kunvenon dum la monatoj Julio, Aŭgusto kaj Septembro, ni daŭrigos la konversaciajn rondojn la lundon, 1an de oktobro.

Ni deziras al ĉiuj feliĉan someron kaj ni rekomendas, se eblas, kontakti kun esperantistoj dum viaj feriaj tagoj.

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
**San Alejandro 6-4ºB. Ext**